

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 55, novembro-decembro 2021



Universala Esperanto-Asocio

Reprezentanto de UEA Francis Hult ĉefparolis en Pintkonferenco de NROj

En la aferoj de UN, lingvoj gravas. Lingvoj peras ĉiujn aspektojn de la laboro de UN, ekzemple humanitaran agadon, packonservadon, socian justecon, homajn rajtojn, migradon kaj publikan sanon. Ili ne ricevas la atenton kiun ili bezonas. Jen la urĝa mesaĝo transdonita de reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio apud UN Francis M. Hult, unu el kvar ĉefparolantoj en lastatempa Pintkonferenco pri Substancaj Demandoj organizita de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (CoNGO), kun la temo “La UN kiun ni bezonas por la mondo kiun ni deziras.” Frontante la demandon pri la graveco de lingvoj por ĉiuj investantoj en evoluigo, ne nur lingvorilataj organizoj, Profesoro Hult emfazis, ke multlingvismo estas esenca por UN kaj civila socio por faciligi travideblon, egalecan partoprenon, dialogon, etendiĝon kaj konsciigon. Rigarde al la estonteco, li alvokis al ĉiuj neregistaraj organizoj en konsulta rilato kun UN, ke ili konscie kaj eksplicite alfrontu la mastrumadon de multlingvismo en sia laboro kun UN-partneroj kaj kun civila socio.

La aliaj tri ĉefparolantoj en la Pintkonferenco estis Irina Bokova, antaŭa Ĝenerala Direktoro de Unesko, Radhika Coomaraswamy, antaŭa Suba Ĝenerala Sekretario de UN, kaj Garry Jacobs, prezidanto de la Monda Akademio de Arto kaj Scienco.

<https://drive.google.com/file/d/1zS1x9aIPrqHlI5ta-LJBE-jD-j48Z4HT/view>

TEJO atingis konsultan statuson ĉe UN

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO, lastatempe gajnis Specialan Konsultan Statuson en la Ekonomia kaj Socia Konsilio (Ekosok) de UN. Temas pri la dua Esperanto-organizo kun tia statuso, kune kun Universala Esperanto-Asocio, kiu kunlaboras kun UN kaj Unesko jam de la jaro 1954. TEJO jam de jaroj kunlaboris kun UN en diversaj roloj, notinde pere de junulara agado ĉirkaŭ la Altnivela Politika Forumo de UN kaj pere de ICMYO, la Internacia Kunrodiga Kunveno de Junularaj Organizoj. En 2019 TEJO partoprenis la Junularan Forumon de Ekosok kaj ĝia reprezentanto, Rakoen Maertens, estis selektita por paroli nome de la junularo en la malferma ceremonio. En 2021 TEJO organizis du flankajn eventojn dum UN-konferencoj – pri lingvaj rajtoj kaj junularo.

“Tiu atingo estas nova etapo kiu donos pli da videblo al Esperantujo ene de la UN-sistemo, notis Valentin Ceretto Bergerat, estrarano de TEJO pri eksteraj rilatoj. Li emfazis la proksiman kunlaboron inter TEJO

kaj UEA kaj la okazojn por estonta kunlaboro. Ĉefa UN-representanto de TEJO estos Rakoen Maertens (Belgio kaj Britio) kaj reprezentanto ĉe UN-Novjorko estos Hans Becklin (Usono).

Komitato de NROj pri lingvo kaj lingvoj fondiĝis

Laŭ iniciato de Universala Esperanto-Asocio kaj aldona grupo de neregistaraj organizoj (NROj), establiĝis Komitato de NROj pri Lingvo kaj Lingvoj por emfazi la gravecon de lingvaj demandoj ĉe UN kaj la bezonon de efika multlingvismo en la laboro de UN. Sub gvido de reprezentantoj de UEA al UN profesoroj Humphrey Tonkin kaj Francis M. Hult, la komitato havas 22 fondajn membrojn, kaj pliaj NROj aldoniĝas. Laborgrupo por starigi regularon kaj fiksi procedurojn estis starigita ĉe la fona kunveno de la Komitato la 9-an de septembro.

Inter la NROj en la laborgrupo estas la Internacia Federacio de Tradukistoj [Fédération Internationale des Traducteurs], la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj [Association Internationale des Interprètes de Conférence], la Ordeno de Sankta Georgo, kaj Red T (Ruĝa T, kiu defendas lingvolaborantojn en militaj regionoj). La unua informkunveno (virtuala) de la Komitato estas planita por 7 decembro, kiam alparolos la grupon s-ro Moses Abelian, Subsekretario de UN pri Ĝeneralasemblea kaj Konferenca Mastrumado, kiu ankaŭ rolas kiel Kunordiganto de Multlingvismo, noe de la Ĝenerala Sekretario de UN.

Ankaŭ parolos en la unua informkunveno Ambasadoro Rabab Fatima, Konstanta Reprezentanto de Bangladeŝo al UN. Estis la iniciato de Bangladeŝo kiu kondukis en 1999 al starigo, fare de la Ĝenerala Asembleo, la Interenacia Tago de la Gepatra Lingvo, kiun oni festas ĉiujare la 21-an de februaro.

Raporto de la Komunua Kontrola Unuo de UN (2020) donas enrigardon al la aktuala situacio de multlingvismo en Unuiĝintaj Nacioj:

https://www.unjiu.org/sites/www.unjiu.org/files/review_highlights_jiu_rep_2020_6.pdf

Unesko jubileas

Post pli ol unu jaro, dum kiu preskaŭ ĉiuj Unesko-eventoj okazis rete, sinsekvis en la konstruaĵo de Unesko pluraj celebradoj.

La 25an de oktobro, la tagon post la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, la Asocio de Eksaj Unesko-Oficistoj festis la centjariĝon de Amadou-Mahtar M'Bow, eksa Ĝenerala Direktoro (1974 - 1987). Ĉeestis UEA-representanto ĉe Unesko, kaj kontribuis per videoj interalie la postaj Ĝeneralaj Direktoroj. Fakte Amadou-Mahtar M'Bow centjariĝis la 20an de marto (Tago de la franca lingvo), kaj tiun ĉi jubileon jam festis en marto Senegalo, kie li nun loĝas. Kiel unua Afrikano, kiu direktoris grandan internacian organizon, li progresigis la multflankismon kaj aparte atentis la komunikadon, inkluzive de Esperanto. Li vojaĝis al Rejkjaviko en 1977 por alparoli la Universalan Kongreson de Esperanto kaj ricevis la premion Zamenhof en 1986. Li celis igi Uneskon "la fandujo en kiu hieraŭaj utopioj iĝas morgaŭaj realiĝoj".

La 12an de novembro, iom aparte de la Ĝenerala Konferenco, Unesko festis sian 75-jariĝon kun ĉeesto de 26 ŝtatestroj kaj registarestroj kaj de multaj famaj artistoj el la tuta mondo. Ne estis sufiĉe da loko por reprezentantoj de la NROj, tamen la ceremonion ili povis spekti en apuda salono II aŭ eĉ rete.

La 41a Ĝenerala Konferenco de Unesko okazas de la 9a ĝis la 24a de novembro 2021. Iom perturbata de la pandemio: ekzemple ne ekzistas aparta programo por NROj. Okazis reelekto de Audrey Azoulay kiel Ĝenerala Direktoro, akcepto sendebate de pluraj novaj internaciaj tagoj, ekzemple tiu de la kisvahila lingvo (7a de julio). Kvinhoma teamo reprezentas UEA, kaj UEA-representanto François Lo Jacomo alparolis la plenon kadre de la Debato pri Ĝenerala Politiko, la 13an de novembro:

[https://www.youtube.com/watch?v=L7Hk-](https://www.youtube.com/watch?v=L7Hk-RrCmQc&list=PLWuYED1WVJIOsFXvWDpkeiUzEtI9IMOHp&index=12&t=9643s)

[RrCmQc&list=PLWuYED1WVJIOsFXvWDpkeiUzEtI9IMOHp&index=12&t=9643s.](https://www.youtube.com/watch?v=L7Hk-RrCmQc&list=PLWuYED1WVJIOsFXvWDpkeiUzEtI9IMOHp&index=12&t=9643s)

Partoprenis ankaŭ ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), per du homoj. Okazas multaj kontaktoj kaj Max Garcia alparolis la Komisionon pri Edukado, reklamante komunan projekton de ILEI kaj la fondaĵo Ningna, "Kungfua kuniklito", animaciaĵoj por instrui al infanoj kiel savi la planedon.

Reorganizita UEA-teamo ĉe UN-Ĝenevo

Rekonstigita teamo de UEA-representantoj ekaktivis ĉe UN-Ĝenevo sub gvido de Francesco Reale, antaŭe la vica reprezentanto. Teamanoj estas Alain Favre, Alessio Sacha Giordano, Mireille Grosjean, Nicole Margot, kaj Adrian Tanner.

Multlingvismo en Eŭropo

La Eŭropa Tago de Lingvoj, 26 septembro, estis kreita por antaŭenigi multlingvismon kaj kulturen interkompreniĝon en Eŭropo, kaj por rekoni lingvan diversecon kiel parton de la eŭropa kultura heredaĵo. Universala Esperanto-Asocio instigis Esperanto-parolantojn partopreni en pluraj aranĝoj tra Eŭropo kiuj festis la diversecon de lingvoj kaj kulturoj. Inter la proponoj: rekono de Esperanto kiel ponto inter eŭropaj lingvoj, kaj la utiligo de Esperanto kiel enkondukilo al lingvostudado en eŭropaj lernejoj.

Parolantoj de Esperanto laboras por toleremo kaj interkompreno

Universala Esperanto-Asocio, en lastatempaj deklaroj, aparte insistas pri la bezono de multflanka kunlaboro kaj toleremo fronte al kreskantaj mondaj krizoj.

“Por esti toleremaj, ni bezonas kompreni unu la alian,” asertis la deklaro de la Asocio okaze de la Internacia Tago por Toleremo (16 novembro). Kaj pro kompreni unu la alian, ni devas serĉi vojojn por transpasi la lingvolimojn.

Kelkajn tagojn pli frue, la 2-an de oktobro, la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj, la Asocio diskonigis similan deklaron, asertante, ke “Konfido kaj solidareco konsistigas esencan vojon por resanigi la mondon kaj krei

pli bonan estontecon. Ni bonvenigas la vortojn de la Ĝenerala Sekretario António Guterres, en sia Komuna Tagordo, ke ni estas en turnopunkto de la historio: la alpaŝo al pli daŭripova kaj paca estonteco por la popoloj de la mondo kaj por la mondo kiel tuto dependas de ni, la nina homaro – kaj de niaj decidoj.”

La deklaro okaze de la UN-Tago daŭras jene: Post kelkaj tagoj, malfermiĝos en Glasgovo la Konferenco de UN pri Klimatŝanĝiĝo, en kiu oni pridiskutos ne iujn lokajn problemojn aŭ regionajn malfacilaĵojn, nek tutmondajn problemetojn, sed la efektivan estontecon de la planedo kaj, kun ĝi, de la homa specio. Ĉu ĉi-foje, ĉu en tiu ĉi Internacia Jaro de Paco kaj Konfido, UN kaj ties membroj trovos la kuraĝon rekte alfronti tiun demandon? Ĉu la voĉoj de la homoj, en ĉiuj ties lingvoj, estos aŭskultataj de UN kaj la diversaj ŝtatoj?”

La mesaĝo de UEA okaze de la Tago por Toleremo aludas al la Deklaracio de UNESKO de Principoj pri Toleremo, de 1995, kiu deklaras, ke “toleremo estas respekto, akcepto kaj aprezo por la riĉa diverseco de kulturoj de nia mondo, de niaj formoj de esprimo kaj niaj manieroj esti homoj. Tio signifas, ke por esti vere toleremaj, ni devas harmonie interagi kaj kunlabori por konstrui malfermajn kaj sekurajn komunumojn por ĉiuj.”

“Toleremo estas pli kaj pli necesa antaŭ la nuntempaj defioj,” asertas la mesaĝo de UEA. “Antaŭ klimata krizo, sankrizo, perforta migrado, rasismo, ekstremismo kaj aliaj defioj, ni ĉiuj devas lerni pri diverseco kaj malfermiteco, kaj malkovri la kulturojn kaj kredojn de aliaj. Ni bezonas pli bonajn leĝojn, edukadon, aliron al informoj, kaj konsciigon.”

Fronte al tiaj grandegaj defioj, UEA atentigas, ke “UN kaj UNESKO deklaris la jaron 2021 la Internacia Jaro de Paco kaj Konfido. Ni hodiaŭ frontas krizon de konfido, en kiu la unuopaj ŝtatoj ofte ne sukcesas rompi reciprokajn malkonfidojn por solidariĝi en la solvado de mondaj problemoj. Mankas, interalie, tiu toleremo kiu fundamentas konfidon, kaj sekve la konfido kiu fundamentas pacon.”

Kiel rimarkigas Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA al Unuiĝintaj Nacioj, kuŝas certa ironio en la fakto, ke, meze de mondaj krizoj kaj senkaŝaj malamikecoj, la membraj ŝtatoj de UN pretas nomi la nunan jaron la Jaro de Paco kaj Konfido. “Rezolucio de la Ĝenerala Asembleo facilas,” komentis Tonkin. “Kial ne fari la intensan laboron kiun tiaj rezolucioj postulas, antaŭ ol tro malfruos?”

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.